

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 2-an de novembro
Francisko prelegos ...
- Sa, la 19-an de decembro
Zamenhofa Festo
- Lu, la 4-an de januaro
Decidota
- Lu, la 1-an de februaro
Ĝenerala Asembleo

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Ni kunsidos en Montreux ĉe la paro *Sunier* lunde, la 5-an de oktobro, je la 20-a kie Marie-Antoinette prelegos pri *« la kaŝitaj mesaĝoj de la akvo »*

COVID19 estas ankaŭ konata kiel kronvira pandemio. (SARS-CoV-2).

La malsano unue estis identigita en decembro 2019 en Wuhan, Ĉinio. La *Monda Organizaĵo pri Sano* deklaris la pandemion, la 11-an de marto. Ĝis la 16-a de septembro 2020, pli ol 29,6 milionoj da kazoj estis raportitaj rezultigante pli ol 936'000 mortoj; pli ol 20,1 milionoj da homoj resaniĝis.

La viruso disvastiĝas ĉefe per malgrandaj gutetoj de tusado, ternado kaj parolado. Homoj ankaŭ povas infektiĝi tuŝante poluitan surfacon kaj poste tuŝante sian vizaĝon.

Rekomenditaj preventaj rimedoj inkluzivas lavadon de manoj, kovro de buŝo dum tusado, kaj ĉefe socia distancigo; se tio ne eblas, necesas portado de vizaĝa masko.

Oftaj simptomoj inkluzivas febron, tuson, spirmankon aŭ spirajn malfacilaĵojn, kaj flaran perdon, ktp.

La pandemio kaŭzis tutmondan socian kaj ekonomian interrompon. Laŭ taksoj, ĝis 100 milionoj da homoj falis en ekstreman malriĉecon kaj tutmondaj malsatoj influas 130 milionojn da homoj.

Misinformadon disvastigis famuloj kaj politikistoj. Komercaj fraŭduloj proponis "miraklajn" kuracaĵojn. Pluraj religiaj grupoj asertis, ke ilia fido protektos ilin kontraŭ la viruso.

Rosario, redaktoro

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Kasta Festo: nuligita

Babiladaj Rondoĵoj
ambaŭgrupe je 19h00:

Ve, la 9-an de oktobro
ĉe Pierre Boizot
Chemin de Renens 52E
076 573 28 75 / 021 311 72 87



Ve, la 23-an de oktobro
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74 / 079 393 32 63



LA LAŬZANA ESPERANTO-SOCIETO partoprenis la konkurson pere de 2 filmoj.

Venu subtenu niajn realigaĵojn

Sabate, la 17-an de oktobro
je la 16-a okazos en la *Centro Karl der Grosse* (Zuriko). la prezentado de la gajnintoj.
<http://esperanto.ch/etfilmkonkurso/filmoj.html>

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Kabo de ___ Espero estas en Sud-Afriko; 5. En bela maniero; 7. Ne kotas ___ en sia nesto; 8. Ne ___ besto en sia nesto; 9. Elektrre ŝargita formo de molekulo.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

2. Plenumoj de ies volo aŭ ordono; 3. Ne kotas besto en sia ___; 4. Grandan en vertikala; 6. Dlimo de matena ĉielruĝo; 7. Simbolo por betkelio je kemio.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Superu malamikon en batalo; 6. Estu kiel ___; 7. Konsontoj de unito; 8. L.; 9. Muzikgenro karakterizata de larĝa uzo de improvizado; 11. Bongustega molusko.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. ___ estas plado manĝita malvarme; 2. Venĝo ___ plado manĝita malvarme; 3. Konsoj de noto; 4. Tipografoj utiligas ___-mastrumajn sistemojn; 5. Unuigintaj Ŝtatoj de Ameriko; 10. Konsoj de azoto.

O	N	O	I	
S	V	L	O	K
O	T	S	E	R
E	E	I	E	
A	Z	O	B	A

O	R	T	S	O
N	O	Z	V	G
O	T		T	N
S	O	T	E	S
K	Z	N	E	A

Karlo de Edmond Privat

Ĉiusomere Karlo veturis hejmen por pasigi kelkajn semajnojn kun siaj gepatroj kaj Heleno. Post sia dua jaro en Bruselo, kiam li revenis hejmen, li trovis sian fratinton fianĉino de juna advokato en la urbo. Lia estonta bofrato estis tre bone konata pro sia delikata elokventeco kaj ankaŭ pro sia afablega karaktero, kiu havigis al li multajn amikojn. Tiu fianĉiĝo kaŭzis multe da invitoj de kaj al la familio Davis.

Tiun someron Karlo vidis kaj revidis multajn personojn en la urbo. La fianĉo de Heleno iam venis peti Karlon, ke li akompanu sian fratinton kun li por viziti amikon de lia patro, kiu ĵus revenis el Hindujo. Estis profesoro Palam, de la Kalkuta Universitato. Li kun sia familio revenis el Kalkuta por pasigi en la urbo du jarojn da libertempo, kiujn li postulis por sia sano.

Dum la juna advokato paroladis pri la talento de la

profesoro, homo tiel interesa, tiel klera, k.t.p., Karlo sentis malnovan fajron rebruliĝantan en sia koro.

Pri la junulino ekvidita en la preĝejo li repensis. Pri la perdita pilko en la parko li rememoris, ankaŭ pri la promenadoj ĉirkaŭ la mistera domo. "Mi plezure vin akompanos tien," li diris.

La tagon, kiam, kune kun la gefianĉoj, li iris al la domo de profesoro Palam, Karlo estis neordinare ekscitita. Heleno tre miris pri tio.

La profesoro kun sia edzino akceptis ilin ĉarme kaj prezentis al Karlo sian filinon. La junulino estis plej bela kaj dolĉa, nun kredeble dudek aŭ dudek-unujara.

"Sinjoro Karlo Davis," diris la profesoro, "mia filino Alico." Kvankam tre konfuzita, Karlo fariĝis kuraĝa. — "La grandan plezuron renkonti vin, fraŭlino, mi jam havis

dekoka ĉapitro: Alico

antaŭ kvin jaroj en la Nacia Parko, kie vi perdis pilkon."

Ŝi ĉarme ridetis iom ruĝiĝante: "Ho, jes, sinjoro, mi memoras, ŝi diris, vi estis tiel afabla!"

Plej agrablan vesperon pasigis Karlo ĉe la hejmo de profesoro Palam. Tien li ofte revenis. Oni petis, ke li legu versaĵojn siajn. Eĉ kanton li verkis, kiun lernis fraŭlino Alico por kanti laŭ ario ŝatata de ŝi.

Ofte fraŭlino Palam estis invitita de fraŭlino Davis; kaj Karlo pro tio estis al sia fratino duoble pli afabla ol antaŭe. Okazis iam, ke Karlo iris kun Alico remadi sur la rivero. Li luis boaton kaj ambaŭ trankvile remis ĝis la arbareto de salikoj. Kiam por vespermanĝo ili revenis hejmen, gefianĉoj ili estis.

La konsenton de gesinjoroj Palam, Karlo facile akiris, same kiel la aprobon de siaj gepatroj. Li estis la plej feliĉa junulo en la mondo.

Intervjuo de Nancy Fontannaz, fidelela membro de LES.

(Fare de Francisko)

Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.

Mi naskiĝis en 1943 en Bex (Vd). Poste mi loĝis en Lausanne. Dum 38 jaroj mi instruis infanojn 7- kaj 8-jaraĝajn, ĉefe en Pully. Tio tre feliĉigis min.

- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?

Foje mi aŭdis mian amikinson Françoise Badoux telefoni al Lucienne Dovat, kaj mi opiniis tiun lingvon stranga, ĉar ĝi ŝajne miksis la anglan "yes" kun vortoj latinidaj... Pro tio la lingvo tiam ne allogis min...

- Kiam vi decidis studi esperanton?

En 1982 mi legis intervjuon de Parzival, kiu diris, ke la idealo de esperanto estas frateco universala. Mi pensis: estas mia idealo! Do mi tuj informiĝis ĉe Claude Gacond kaj lernis!

- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?

Ili pensis: denove pasio! Ĉu daŭros?

- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?

Krom Françoise Badoux kaj la aliaj svisaj esperantistoj, dank'al kongresoj mi havas geamikojn en Ĉeĥio, Kanado kaj Estonio. Mia patro, en la Grupo J.E.A.N., renkontis Lucienne Dovat, kiu instruis esperanton pere de la Rika Metodo. Tio interesis lin, ĉefe la semantika flanko de la lingvo.

- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?

Ĝi okazis en Budapeŝto en 1983. Mi memoras, ke mi ege miris vidante izraelanon kaj libananon afable diskuti kune, dum iliaj landoj tiutempe forte batalis... Do frateco ja komenciĝis !

